Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

ESPERANTO EN LA SCIENCOJ

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA

Scienco kaj tekniko ludas ĉiam pli gravan rolon en la evoluo de la kulturo kaj civilizacio de la socio. La scienco estas internacia, kaj la diverseco de la lingvoj signifas gravan obstaklon por ĝia komunika, samrajta kompreno. Ne estas mirige, ke jam frue la Internacia Lingvo vekis la intereson de sciencistoj.

Jam en januaro 1904 ekaperis ***Internacia Scienca Revuo*** kun kontribuaĵoj de konataj sciencistoj, parte ampleksaj tradukitaj referaĵoj, sed ankaŭ multaj raportoj pri originalaj esploroj. Ĝi ludis gravan rolon por ellaborado de la scienca lingvouzo en Esperanto. Dum la 2a Universala Kongreso en Genevo en 1906 okazis prepara kunveno por fondo de Internacia Scienca Asocio Esperantista, kies formala fondo okazis la 15an de aŭgusto 1907 en Cambridge (Kembriĝo). Per tio ISAE estas la plej malnova faka asocio en la Esperanto-movado. Tiama vicprezidanto estis cetere la Nobel-premiito J. Thomson, profesoro pri fiziko ĉe la Universitato de Kembriĝo.

Post la dua mondmilito ISAE en 1949 komencis eldonadi la nunan ***Sciencan Revuon*** kun enhavo generale naturscienca. Ĝin eldonis unue la nederlanda eldonejo Musses kun ĉefredaktoroj W.P. Roelofs kaj G.F. Makkink; poste la eldonadon transprenis ISAE mem, sub redakto de B. Popovic kaj poste J. Kavka. Hodiaŭ redaktas R. Hauger kunlabore kun C. Støp-Bowitz kaj S. Norvell. La revuo publikigas i.a. prelegojn de la Internacia Kongresa Universitato kaj ĝenerale klerigajn referaĵojn kaj originalajn studojn pri natursciencaj,

Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

teknikaj kaj socisciencaj temoj. Ĝi estas legebla kun profito de ĉiu klera homo kaj meritas esti legaĵo ankaŭ en vastaj rondoj ekster tiuj de la sciencistoj. La aldona *Bulteno* informas pri administraj kaj organizaj temoj.

Same grava kiel la eldonado de sciencaj revuoj tute en Esperanto estas ke tiu internacia lingvo eniru la ĝeneralan nacilingvan sciencan gazetaron, ke en la revujoj de sciencaj observoj kaj esploro aperu traktaĵoj en Esperanto de kompetentaj fakuloj aŭ ke la aŭtoroj kaj la redaktoroj minimume aldonu al la traktaĵoj en aliaj lingvoj resumon en Esperanto. En Ĉinujo ekz. la entomolgia revuo ***Entomotaxonomia*** publikigas artikolojn aŭ resumojn ankaŭ en esperanto. Necesas, ke la sciencistoj vidu, ke tiu lingvo estas uzata de kolegoj.

Diversaj esperantistaj sciencistoj produktas scienctemajn librojn en nia lingvo, parte popularsciecanj, ekz. ***La vivo de la plantoj*** de P. Neergaard, sed ankaŭ pure sciencajn librojn, ekz. ***Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj***. Okaze de la 50-jara jubileo de ISAE aperis en 1958 240-paĝa volumo ***Sciencaj Studoj***, konsistanta el 37 originalaj esplorraportoj el diversaj fakoj, verkitaj en Esperanto. Same impona estas la verko ***Likenoj de okcidenta Eŭropo***, laboraĵo de Akademio internacia de la Sciencoj San Marino.

Kiam estiĝis la ondo de intereso pri Esperanto en Irano kaj poste en Ĉinujo aperis la demando pri lernolibroj en Esperanto pri diversaj sciencaj temoj. Tiam la nuna estrarano de ISAE, R.K. Jones, kune kun aliaj fakuloj, prizorgis tradukon de 574-paĝa universitata lernolibro pri kemio.

La celo de ISAE estas apliki kaj iom post iom akceptigi Esperanton en la sciencaj medioj: ĝi estu ligilo inter sciencistoj kaj teknikistoj el ĉiuj sciencaj fakoj,

Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

natursciencaj kaj sociscienca; aldona celo estas la disvastigo de sciencaj konoj inter esperantistoj.

En landoj, kie la asocio havas plurajn membrojn, funkcias landa delegito, kies tasko estas varbado de membroj kaj kolektado de kotizoj. Cetere la delegito kaj aliaj membroj klopodu interesigi la rondojn de sciencistoj kaj teknikistoj en siaj landoj. En kelkaj landoj, ekz. Nederlando kaj Norvegujo, la membroj formas landajn filiojn, kaj aliflanke la membroj povas formi fakajn sekciojn.

La landaj delegitoj, prezidantoj de la landaj filioj kaj de la fakaj sekcioj formas la Komitaton, al kiu aliĝas la redaktantoj de *Scienca Revuo*. La Komitato elektas la 5-membran estraron. Landajn delegitojn aŭ perantojn la asocio havas en diversaj mondpartoj. Siajn kunvenojn la asocio okazigas ĝenerale dum la Universalaj Kongresoj.

Antaŭ kelkaj jaroj la asocion trafis ekonomia krizo kaj ĝi perdis membrojn kaj enspezojn. Tiam la asocion ekonomie savis la valora helpo, kiun la norvega filio ricevis de la Legaco Rolf Uhlen de la norvega movado; la energia agado de la sekretario-kasisto kaj de la prezidanto sukcesis revenigi la stabiligitan asocion sur prosperan vojon, novaj membroj komencis aliĝi kaj denove eblis eldoni po 2 kajeroj de *Scienca Revuo* jare.

Ke ekzistas intereso en sciencistaj rondoj montras la fakto ke aperiĝas fakaj publikaĵoj pri apartaj sciencaj temoj, ekz. pri medicino, matematiko, geologio, ornitologio, speleologio. Ankaŭ la Someraj Universitataj Kursoj provizis per eldonado de la tekstoj de siaj kursoj la movadon per sciencnivelaj publikaĵoj. Jam ekde jaroj en Ĉinujo aperas revuo *Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj*, eldonata de Sciencista-teknikista Esperanto-Asocio en la Ĉina Akademio de Sciencoj, kaj

Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

la Internacia Kongresa Universitato ĉiujare prezentas prelegojn de fakuloj pri diversaj temoj.

Tamen, la ofte emfazita «scienca aplikado» de la internacia lingvo bezonas pli fortan fakan asocion, kiu povas ne nur eldonadi revuon, sed kiu baziĝas sur la necesa subteno en la rondoj de sciencistoj kaj teknikistoj. Inter la delegitoj de UEA multaj indikas en la *Jarlibro* de UEA profesion rilatan al ia scienca temo, kaj sendube ankaŭ inter la ceteraj esperantistoj troviĝas multaj, kiuj okupiĝas pri sciencaj temoj aŭ kiuj interesiĝas pri progreso de Esperanto en fakaj rondoj. Ni invitas ĉiujn tiujn homojn membriĝi en ISAE kaj ni invitas ilin sendi fakajn artikolojn por publikigo en la *Scienca Revuo*. Personoj en landoj kun malforta ekonomio eĉ povas fariĝi membroj per sendo de kompetentaj artikoloj. Ili ĉiuj povas, per membriĝo en ISAE, kundecidi la direkton de la esperantlingva scienca agado per aktiva publikigo de sciencrilataj temoj kaj demonstri rekte la sciencan aplikon kaj taŭgecon de la internacia lingvo.

La estraro de ISAE kaj la redakcio de la *Scienca Revuo* estas survoje certigi denove la regulan aperigadon de minimume 2 kajeroj jare. Tiu eldonada sukceso subtenas la diskonigon de Esperanto en fakaj rondoj, ĉar vere urĝas la refortiĝo de la plej tradicia esperantlingva nuturscienca asocio, kolektante en ĝi laŭeble multajn sciencfakulojn kaj sciencamikojn, kiuj pretas, ne nur rezolucie, sed praktike antaŭenpuŝi la internacilingvan kompreniĝon per faka praktikado.

C. Støp-Bowitz, prezidanto de ISAE
R. Hauger, ĝenerala sekretario